

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

HANSA

STOCKHOLM

Eget kapital kr.

6.000.000

meddelar följande slag av försäkring:

1. Sjö- & transportförsäkring
2. Brandförsäkring
3. Vattenskadeförsäkring
4. Glasförsäkring
5. Inbrotts- & rånförsäkring
6. Resgodsförsäkring
7. Storm- & hagelskadeförsäkring
8. Maskinförsäkring
9. Garantiförsäkring (redovisningsborgen)
10. Kreditförsäkring
11. Luftfartförsäkring
12. Automobilförsäkring
13. Ansvarsförsäkring
14. Sjuk- & olycksfallsförsäkring
15. Olycksfallsförsäkring (enbart)

Ombud: Kamrer Ad. LARSON

Telefonanrop: HANSA



SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Henning Halldor.
Postadress: Fack 698, Stockholm.
Prenumerationspris: Helt år 2 kr.
Lösnummer 0,20.
Annonsspris: 10 öre pr m.m.
Utkommer en gång i månaden.

Sveda Esperanto-Gazeto.

Redaktanto: Henning Halldor.
Adreso: Stockholm 1.
Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1

har till uteslutande/ändamål det mellan-
folkliga hjälpspråkets utbredande och
befrämjande.

Årsavgift för direkt anslutna medlemmar
kr. 5: — inberäknat prenumerationsavgiften
för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.
Tel. 279.

Sekreterare: Henning Halldor, Frid-
hemsgatan 42, Stockholm.

Tel. kl. 9—5 228 64 efter kl. 6 e. m. Kungs-
holmen 1838.

Förlagsföreningen Esperanto

u. p. a.

Postadr.: Fack 698, Stockholm 1.
Postgirokonto nr 578.

**De svenska esperantisternas eget
företag.**

Tillhandahåller all slags litteratur på och
om esperanto.

Prislista och upplysningar på begäran.

Svenska Esperanto-Institutet

Förrättar examen i esperanto.

Ordförande: Rektor S. Jansson, Sko-
gen 23, Lidingö Villastad.
Tel. Lid. v.-stad 295.

Förlagsföreningen Esperantos ombud.

Ekeby: Alb. Johansson, Valleberga.

Eskilstuna: Eskil Johansson, Telefonstation.

Falun: Ernst Ström, Box 23.

Fyrunga: Erik Brenander.

Glemmingebro: Gotth. Månson, Ingelstorp 3.

Gävle: Alb. Liljemark.

Göteborg: Anders Pettersson, Villa Njord,
Burås.

Hynboholm: Per Söderholm.

Hällefors: Gustaf Jönsson.

Hälsingborg: Gummessons Bokhandel, Sö-
dergatan 17.

Karlstad: Kand. Einar Dahl, Seminariegat. 4.

Kavläs: Erland Björkman, Kungslena.

Korsnäs: Karl E. Fahlgren, Box 32.

Lilla Edet: Nils Pettersson, Järnvägen.

Linköping: John Svensson, Snickaregat. 20.

Ljusdal: W. Svensson, Templarhuset.

Ludvika: E. Lundin, Box 429.

Lycksele: Gustaf Johansson, Box 189.

Lyse: S. J. Kull, Kolleröd.

Malmö: Aug. Larsson, Bergsgatan 28.

— S. A. Svensson, Altonagat. 3.

Mjölby: Hasse Elfsten, V. Hårgsvägen 20.

Nordingrå: Frans Quist, Torrom.

Norrköping: Erik Johansson, Telefonstation
(hos Löfgren).

Nynäshamn: Karl Karlsson, Villagat. 18.

Nässjö: J. O. Nyström, Norlundagat. 3.

Ockelbo: A. W. Hultström, Böle.

Motala: K. Delstam, Järnvägen.

Saleby: Albert Alfredsson, Trässberg.

Sandviken: Evald Forsberg, Norra Villa-
staden 20.

Sigtuna: Karl Karlsson, Klappslett.

Skara: Redaktör Erik Bogren.

Skoghall: Komminister Joh. Lindberg.

Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto,
Fack 698.

— H. Halldor, Lästmakaregatan 12, 3 tr.
(Viola) eller Fridhemsgat. 42, 2 tr. Tel.
228 64; Kungsh. 18 38.

Södertälje: Henning Larsson, Skogsidyllen.

Sundsvall: C. W. Sjögren, Nygatan 33.

Torskors: Fritiof Ahnfelt, Inglatorp.

Vreta kloster: Carl Asp, Källhem.

Västerås: O. Dahrné, Hammarbygatan 2.

Örebro: Philip E. Jansson, Eklunda 12.

Örnsköldsvik: P. Lundkvist, Mon.

Örtofta: Martin Dahlin.

På varje ort i Sverige önska vi lösnum-
merförsäljare. SVENSKA ESPERANTO-
TIDNINGENS EXP., Fack 698, Stockholm I.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

IDA ÖHMAN.

Kiam antaŭ dudek kvin jaroj ni blinduloj ĝenerale ekinteresiĝis pri Esperanto, atentigitaj pri ĝi per artikoloj en niaj reliefgazetoj, tiam mi ricevis multe da leteroj, en kiuj oni esprimis sian ĝojon pro la nova grava helpilo kaj demandis pri detaloj de la lingvo. Inter tiuj leteroj estis unu, kiu konsistis el nur unu paĝo, sed senerare skribita en Esperanto post unusemajna studado de la internacia helplingvo. La skribintino estis f-ino Ida Öhman, kies intereso pri nia movado poste daŭris ĝis ŝia morto. La lasta pruvo, kiun ŝi donis pri tiu intereso, estis testamenta donaco de kvin mil kronoj, donitaj al "De Blindas Förening", sed kies rentumo estos ĉiujare donata al "Esperanta Ligilo". Nur se tiu gazeto ĉesos ekzisti, la asocio rajtos uzi la monon por aliaj celoj.

Ida Öhman naskiĝis la 6 de Junio de la jaro 1862 kiel fi-ino de pogranda ligna komercisto en Umeå. Havante la aĝon de nur dek ses jaroj, ŝi malsaniĝis pro ŝvelaĵo interne de la kranio, kio baldaŭ kaŭzis ŝian blindiĝon. Tiel komenciĝis vivo de suferado — pli ol kvardekjara suferado. Ni blinduloj neniel konsideras nin kiel suferantojn, sed ŝia vivo fariĝis kvazaŭ seninter-

rompa ĥirurgia operacio, ĉar la enkrania ŝvelaĵo devis, de tempo al tempo, esti malpliigata, por ke ĝi ne tro kresku kaj per premo sur la cerbo kaŭzi turmentoplenan morton. Almenaŭ unufoje ĉiun monaton okazis tia operacio, farata tra la naza kavaĵo kaj tra unu okulo. Post ĉiu operacio ŝiaj fortroj estis ege malgrandaj. Cetere ŝi estis, eĉ dum siaj plej bonfartaj tempoj, ege malforta. Oni vere povas diri, ke ŝi vivis per la arto de la ĥirurgiistoj. Por esti pli proksime al lerta ĥirurgiisto profesoro Key-Aberg ŝi baldaŭ loĝiĝis en Stokholmo. Feliĉe ŝiaj ekonomiaj cirkonstancoj, eĉ post la morto de ŝia patro (en 1897), estis sufiĉe bonaj... Pri ĉio en la homa kulturo ŝi vive interesiĝis, kaj ŝi laboris tre multflanke. Lerta manlaboristino, ŝi trikadis kaj kroĉtrikadis por la »labordometoj» en Norrland, transkribis librojn por la blindulbiblioteko, faradis belajn artajn florojn kaj aliajn ornamaĵojn por filantropiaj bazaroj k.t.p. Sed ĉiun laboron ŝi, pro sia ega malforteco, devis fari je tre malgrandaj porcietoj. Post trikado de kelkaj tavoloj, post transskribado de unu sola paĝo, post aŭskultado de plej mallaŭta interparolado ŝi nepre de-

vis kuŝiĝi kaj resti senmova dum duonhoro. Ŝi ne povis toleri societon, ĉar ŝia kapo doloregis kaj ŝi eksvenis, se multaj personoj parolis en sama ĉambro. Sed post la duonhora ripozo ŝi denove eklaboris, senĉese laborante je tiaj porcietoj, kaj la rezultato de ŝia laboro estis mirinda, kiel ŝi mem.

Mirinda estis Ida Öhman, ĉar oni nenie povus trovi pli gajan, pli vere spritan kaj humoran personon ol tiu suferantino. Ĉiam ŝi bagateligis siajn suferojn kaj ridis kaj ridigis pri ili. Sed pro la suferadoj de aliaj homoj neniam batadis pli varma koro ol la ŝia. Ŝia lasta vorto estis ŝerceta. Ŝia kunloĝanta amikino demandis ŝin ĉe la leviĝo unu matenon, ĉu ŝi deziras tason da kafo. »Kiam vi spertis, ke mi malakceptis tason da kafo?» ŝi ridante respondis. Tiu estis ŝiaj lastaj vortoj, ĉar, kiam la amikino revenis kun la kafo, fino Öhman rekuŝiĝis kaj perdis la konscion, kiun ŝi ne rericevis. Ŝi mortis la 16-an de jan. tiun ĉi jaron.

Ŝi finis vivon plenan je suferadoj, vivo kiu tamen donis impreson de tre feliĉa vivo. Kiel tio estas ebla? vi demandas. »Kiu vivas por feliĉigi aliajn, tiu mem vivas feliĉe», iu diris, kaj tio certe estas la solvo de la problemo pri la ĉiam gaja, ĉiam sunbrila vivo de Ida Öhman. Kiu kunvivadis kun ŝi, tiu atestas, ke ĝojo kaj feliĉo kvazaŭ elradiis el ŝi kaj komunikigis al la ĉirkaŭuloj. Feliĉa ŝi ŝajnis ankoraŭ en la morto, kaj ni malenvias al ŝi la feliĉon, kvankam al ni estas tre melankolia penso, ke ni neniam reaŭdos ŝian gajan, ridetantan, kuraĝigan, amoplenan voĉon.

Harald Thilander.

Du gravegaj libroj.

Lastatempo aperis du libroj en Esperanto, kiuj havas plej grandan intereson, la unua por la Esperantistoj en la tuta mondo kaj la dua por la svedoj. En niaj manoj tiuj libroj estas valoraj pruvoj pri la vivo de Esperanto, pri la progreso de nia mondlingva afero kaj la plifortiĝo de nia kara lingvo.

La unua libro estas La Sankta Biblio kiun nun eldonis La Brita kaj Fremdlanda Biblia Societo. Zamenhof, nia neforgesebla majstro, jam faris la tradukon de la Malnova testamento, la tradukon nun reviziis spertuloj.

La kompleta biblio estas vera monumento pri la signifo de nia lingvo.

La dua libro, kiu precipe interesos niajn svedajn samideanojn, estas la traduko de »De lycksaliges ö» de August Strindberg, kiun la firmo Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, envicigis en la serion Internacia Mondliteraturo sub la titolo »Insulo de Feliĉuloj». Tradukinto estas s-ro Oskar Frode. Tiu libro estas ĝis nun la plej granda sveda verko tradukita en Esperanton, kaj per ĝi nia lando kaj literaturo estas reprezentataj en la internacia esperanta literaturo.

Ni kredas ke tiuj novaĵoj ĝojigos niajn legantojn. Evidentiĝas ke la esperantistoj ne dormas sed konstante laboras. La libroj estas haveblaj, nun la esperantistoj havigu ilin al si kaj ankaŭ igu aliajn personojn ilin aĉeti.

La infanĥoro el Svennevad.



La membroj de la infanĥoro en Svennevad antaŭ sia lernejo.

Ĉe la ĵarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio en Örebro dum la Pentekosto kantis infanĥoro el Svennevad svedajn kaj esperantajjn kantojn sub gvidado de nia samideano s-ro kantor Linus Andrén, instruisto en la popollern-

ejo de Svennevad. La horo ricevis multajn aplaŭdojn. Sur la bildo oni vidas la infanojn kune kun sia instruisto kaj paroĥestro. Farigu ili ne nur grandaj sed ankaŭ bonaj homoj kaj — entuziasmaj esperantistoj!

lom pri kredo.

Ian vesperon mi vizitis la redaktoron de tiu ĉi estimata gazeto. Enveninte en lian ĉambron mi komence kredas ke li estas irinta en alian ĉambron, ĉar mi nenian vidas. El trans monto da paperoj mi tamen ekaŭdas voĉon, kiu salutas min bonvenanta. Estas la redaktoro, kiu sidas ĉe sia skribotablo »en laboroj super la oreloj». Memvola laboro! Krom sia profesia ofico li estas delegito de U. E.A., sekretario de S.E.F., prezidanto de la Eldona societo, redaktoro de tiu ĉi bona gazeto k.t.p.

La lastaj tre malmulte profitigaj kaj multfoje eĉ nedankaj okupoj. Inter mil kaj unu devoj memvolaj, kiuj okupas lian libertempon, la laboro pri la senpaga kurso ne estas la malpli laciga kaj tempoglutanta. Preparo, presigo, reklamo (skribado al ĉiuj gazetoj de Svedujo), hektografado, senfina adresskribado, notado, afrankado, forsendado k.t.p., k.t.p., ĉio ĝuste »manĝegas» kaj »manĝegis» tempon. Tie ankaŭ estas leteroj el ĉiuj anguloj de la mondo, kiuj postulas »tujan» respondon. Respondoj kiuj eble kaŭzigas kaj tempoperdon kaj elspezon.

Sed — ne pri tio mi estus skribanta.

Rilate al la korespondada kurso, mia amiko rakontas al mi, ke sinjoro, mendante la kurson skribas, ke li »kredas» ke oni ne povos lerni Esperanton per tiu kurso. Mi ne povis ne ridi je tiu rakonto. Krom tio, ke la kurso pretendas esti nur elementa, ĉu iafoje jam ekzistas ia instruisto, kiu povis instrui homon, kiu »kredas», ke li ne povos? Mi »kredas» ke ne! Ne estas la instruisto, kiu lernigos la lernanton, sed la lernanto, kiu lernu de la instruisto. Se homo ne volas lerni aŭ ne havas firman volon lerni, instruisto kiom ajn lerta ne povos lerni tiun homon.

Kiom multe »kredas» la homoj! Ili »kredas» ke ili ne povas interkompreniĝi en »artefarita» lingvo. Se oni antaŭmetas al ili tute klaran realan fakton kontraŭan, ili nur skuas la kapon kaj diras: »Vi ne konvinkos min, vi estas tro optimista, mi ne »kredas» ke — —» k.t.p.

Estas vere mirinda ke tia homo estas tiel optimista ke li eble veturas aŭtomobile. Ke li »kredas» ke povas kuri aŭtomobilo sen »naturaj» kruroj. Kia optimisto! Antaŭ nur kelkaj jaroj sveda gazeto*) enhavis aprilŝercon pri aŭtomobilstacioj en sia urbo, kie aŭtomobiloj anstataŭigos la ĉevaldroŝkojn. La homoj legis kaj ridegis pro la bonega »ŝerco» kaj diris ŝerceme ke baldaŭ oni ne plu vidos ĉevalon sur la strato.

Kiel estas hodiaŭ? Kiu estas pli

*) En la nomo de la vereco, ni devas konstati, ke tiu fojo estis senkulpa "Svenska Dagbladet".

malofte sur la strato, ĉevalo aŭ aŭtomobilo?

Kiel vere funkcias hodiaŭ la aŭtomobilo, tiel vere ankaŭ funkcias bonege la lingvo Esperanto. La unuan la homoj »kredas», ne la duan. Pro kio? Diru, pro kio?!

Ni, kiuj ne nur kredas sed scias ke ekzistas kaj funkcias Esperanto, lasu nin persisti! Fine tamen venkos la racio spite al ĉiuj »mine-kredas-uloj».

H. S.

Sveda kroniko.

STOCKHOLM. Ni havis en ĉi tiu jaro vizitojn de kelkaj eksterlandaj samideanoj. Unue venis germana fervojisto, s-ro C. Heinrich el Hof a. S., kiu restis unu tagnokton kaj poste veturis al Abisko por vidi la meznoktan sunon. Iom poste venis d-ro Lummerzheim, ankaŭ germano, kun edzino. Lin akompanis d-ro Mertelsmann kun edzino. Ili restis dum 6 tagoj. D-ro L. jam antaŭ 15 jaroj estis en Stockholm pro studoj.

Mallongan viziton faris s-ro Parley Parker Christensen el Usono. Ankaŭ li estis vidonta la meznoktan sunon en Abisko.

En Aŭgusto venos anglo, s-ro Gibson.

ŜERCO.

— Han talar tyska, engelska, franska och italienska flytande. Han är ett fullkomligt språkgeni.

— Talar han esperanto också?

— Ja, som en inföding.

(Karikaturen, Oslo.)



Till Franska arbetaresperantoförbundets fjärde kongress i Paris under pingsten hade författaren Henri Barbusse sänt ett långt och uppmuntrande brev, vilket väckte stor anklang.

Geografio.

Oni ofte diras, ke la praktikado de Esperanto, kiu metas nin en kontakton kun homoj el ĉiuj popoloj kaj landoj, donas al ni ankaŭ bonan scion de geografio. Tio estas vero. La Esperantistoj scias pli bone ol aliaj homoj sian geografion.

Sed okazas tamen, ke eĉ esperantistoj montras malkonon. Mi citu ekzemplojn. Oni sendis al mi el Usono poŝtaĵon kun la adreso: »Stockholm, Holland»; alian el Francujo adresitan: »Stockholm, Norvegujo»; germana adresinto skribis: »Stockholm, Danujo». En Esperantista gazeto oni legas hodiaŭ nomaron de landoj, kie sin trovas ankaŭ »Suede-Norvege». Kiam atingos ilin la scio, ke la unio politika de »Svedujo-Norvegujo» depost pli ol en la jaro 1905 (sen milito); post tio la du landoj estas tute sendependaj, alivorte ne ekzistas ia »Svedujo-Norvegujo» depost pli ol 20 jaroj, nur Svedujo kaj Norvegujo, simile kiel Hispanujo kaj Portugalujo.

Esperantistoj ne peku kontraŭ la deĉo en tiu ĉi kampo. Ni lasu la geografian malsciadon al la barbaroj!

Ofendeto:

En passepartout.

En passepartout, d. v. s. en huvudnyckel, kan öppna en mängd dörrar. Har man en sådan, så slipper man släpa med sig en större nyckelknippa och når ändå samma resultat: man kommer in i alla rummen. Nu kanske det finnes människor, som tycka om att gå omkring med många nycklar — det kan ju ge ägaren ett visst anseende — eller som finna ett särskilt nöje i underligt gjorda lås och märkvärdigt formade nycklar. Men för de flesta är det huvudsaken att komma in i rummen, och ju enklare detta kan gå för sig dess bättre.

Vad äro nationalspråken annat än mycket krångliga nycklar till de olika folkens sjäsliv och kultur, nycklar som man endast med otrolig möda kan förvärva! Och esperanto åter är denna huvudnyckel, som passar till alla sådana lås, och t. o. m. kan öppna de innersta hjärterummen hos människor!

Förstår man då inte, att personer, som av omständigheterna hindrats att förvärva de intressanta och märkvärdiga nycklar, som nationalspråken utgöra, gärna gripa till esperantonnyckeln. Och att praktiskt folk föredrager detta praktiska medel att nå alla folk. Bör man inte göra allt för att visa folk på detta utomordentliga verktyg? Det kan inte dröja länge förrän huvudnyckeln esperanto tages i allmänt bruk.

S. Jn.

La maljuna onklino: — Kiel plaĉas al vi la lernejo, amiketo?

La knabeto: — Ĝi estas bona — kiam ĝi estas fermita.

Libroj kaj Gazetoj.

Literatura okazo.

Estas al la sveda esperantistaro iom embarasige, ke tiom malmulte el nia altranga nacia literaturo estas tradukita esperanten. Ĝis nun ni havis efektive nur paron da dramoj de Strindberg por reprezenti nin en la internacilingva mondliteraturo. Tiom pli ĝojiga ŝajnas la okazintaĵo, ke unu el la lastaj verkoj eldonitaj de Hirt & Sohn en Leipzig en la kolekto Internacia Mondliteraturo estas Strindberg-a novelo el Svenska Öden och Äventyr, nome »De lycksaliges ö», tradukita de fil. mag. Oskar Frode sub la titolo »Insulo de Feliĉuloj».

Ĝojige — sed kial ree Strindberg? Kaj, se nepre Strindberg, kial ĝuste la tipa ŝtofo el la »okdekjaroj»? La literaturaj kliŝoj el tiu jardeko certe enuigas la plejmulton de la nuntempa homaro. Kial ne elekti iun el la ĉiam freŝaj, viglaj, pure beletristikaj verkoj de la aŭtoro? Mi eĉ opinias, ke la tradukinto, ev. liaj konsilantoj, estus povinta trovi pli eminentan kaj interesigan verketon ol la koncernitan, eĉ en la sama kolekto (ekz. »Odlad frukt»). Parte la »Insulo de Feliĉuloj» ŝajnas al mi malpermesinde tediga. Kaj por tute kompreni la pli lerte verkitajn kaj pli interesigajn partojn de la novelo oni efektive devas koni nian nacian historion, la evoluadon de nia nacia socio kaj ankaŭ la persona historio de la verkisto mem. Nur ampleksa komentaria aldono po-

vus miaopinie plene pravigi ĝian prezentadon al la mondpubliko.

Sed ĉiu verketo de Strindberg havas daŭran valoron, kaj la traduko de Oskar Frode estas ĉiukaze tre leginda. Ni devas gratuli nin mem kaj la tutan esperantistaron je tia debutinto en nia literatura mondo. La senerareco de la lingvo kaj la lerteco je vortfarado kaj perioda konstruado atestas la neordinaran lingvistan talenton de la tradukinto. La stilo estas treege eleganta kaj tiom klara kiom eble permesas la originalo. Mirinde kaj admirinde la tradukinto sukcesis esperantigi ne nur la lingvajn elementojn de la prozo de Strindberg, sed efektive ankaŭ lian senkomparan stilon.

La sola kritiko, kiun pravigus la traduko, temus pri troa fideleco al la originalo. Estas vere ke granda verkisto kaj stilisto devas esti tre fidele reproduktita traduke, por ke la karakterizaj trajtoj de lia stilo estu konservataj. Sed mi timas, ke kelkaj esprimoj en la »Insulo de Feliĉuloj» fariĝis nekomprenablaj al la nesveda legantaro, ĉar la tradukinto ne sufiĉe atentis samtempe la regulon, kiu regu ĉian tradukon esperanten: traduku laŭidee, ne laŭvorte!

Jam parolis la antikvuloj pri la granda malfacileco trovi mezvojon inter la troeco da multe kaj malmulte — *mediocritas inter nimium et parum*. Je la menciita rilato s-ro Frode certe estos pli bone distinganta tiun mezvojon en alia traduko, espereble baldaŭ venonta.

Johannes Lindberg.

BENJAMENO F. SMITH. Historieto pri elfarado. De Everett

W. Lord. 17-paĝa libreto tre bone presita kaj bindita. Sed — kio estas »elfarado»? Ni ne sukcesis trovi taŭgan tradukon de tiu vorto.

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. Paris, Esperantista Centra Librejo. Prezo 2 fr. Enhavas regularon, nomojn de la komitanoj k.t.p.

SVISA POŝTA DIREKCIO EN BERN eldonis belajn vidaĵkartojn pri la alpveturado en Svisujo, kiuj kompletigas la landkartojn jam eldonitajn. Senpage riceveblaj ĉe Jules Perlet, Poŝtkesto transito 560, Bern.

S-ro Perlet ankaŭ dissendas prospekton pri INTERNACIA EKSPOZICIO PRI RIVERA NAVIGADO kaj uzo de hidraŭla forto, 1a Julio—15a Sept. 1926 en Basel.

Nia listo pri delegitoj.

Kelkaj el la delegitoj sur nia listo en la aprila numero atentigis nin, ke ili estas lokitaj en malĝustaj provincoj.

La afero estas la jena, ke ni uzis je la starigo de la listo ĉefe la nomaron de poŝtoŝtacioj, sed tiu nomaro kiel ankaŭ la plej multaj aliaj tute ne ordigas la lokojn laŭ provincoj sed laŭ gubernioj. Al ni ŝajnis tamen plej praktike ordigi la liston laŭ la provincoj, ne laŭ gubernioj. Je represado de la listo la malkorektaĵoj facile povos esti korektataj.

Bilaga.

Med detta n:r följer som bilaga ett prospekt över nya böcker från Förlagsföreningen Esperanto.

Esperantostjärnor åter inkomna.

På sista tiden har förrådet av esperantostjärnor varit knappt, emedan fabrikanten dröjt ovanligt länge med leveranserna. Nu ha vi lyckats förvärva en ny fabrikant, så att hädanefter kunna vi effektuera hur stora beställningar som helst.

Vi komma hädanefter att huvudsakligen tillhandahålla den gröna stjärnan med inskription ESPERANTO i form av nål, vilken vi rekommendera såsom den verkningfullaste. Priset blir oförändrat 75 öre.

Bärandet av den gröna stjärnan är vår »minimума devo», dels sätter den våra anhängare i stånd att upptäcka varandra när de råkas och dessutom skänker den oss många tillfällen att tala om vad esperanto är.

Bär därför alltid stjärnan!

SERCO.

Kiam la vagonaro estis ekironta, alkuranta viro kriegis:

»Pettson, Pettson!»

Scivolema sinjoro eligis sian kapon tra la fenestro kaj ricevis en la sama momento vangofrapon. La vagonaro foriris. La sinjoro koleriĝis, kaj ĉe la proksima stacio li eliris kaj raportis la aferon al la staciestro.

»Ĉu via nomo estas Pettson?» la staciestro demandis.

»Ne».

»Jes, kial vi do eligis vian kapon?»

Kaj la vagonaro ree ekiris.



SILVERRÅVSODLING

erbjuder svenskarna en ny inkomstkälla.
 Begär upplysningar angående inköp av rasförädlade, av kanadensiska staten registrerade avelsdjur från det välkända

Winnipeg Silver Fox Co:s

Generalagent för Sverige:

FREDRIK SKOG, FALUN.

Illustrerad Handbok på svenska 3 kronor.

UNDERAGENTER ANTAGAS.

S. E. F:s Propagandafond.

	Transp.	1,789:65
139. Jacob Jacobsson		25:—
	Kronor	1,814:65

Radio.

Den 6 sept. kl. 7,40—7,55 (engelsk tid) kommer att från Daventry ut-sändas ett esperantoprogram, troligen ett föredrag på engelska om esperanto samt sång m. m. på esperanto. De som uppfatta sändningen väl torde därefter tillskriva British Broadcasting Comp., Savoy Hill, London W. C. 2.

Interesa novaĵo.

Verdkata Testamento

De Raymond Schwartz.
 Plena de gaja, pariza spirito.
 PREZO KR. 1:50.

Förlagsfören. Esperanto, Stockholm 1.

Till våra läsare!

På grund av flera samverkande omständigheter ha juli- och aug-numren måst sammanslås till ett, ehuru vi icke tänkt att dubbelnummer skulle behöva förekomma mer.

Redogörelse över den intern. esperantokongressen i Edinburgh kommer att inflyta i sept.-n:t.

1926 års Prislista från Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Fack 698, Stockholm 1. — Postgirokonto N:r 578

Order överstigande 10 kr. försändas portofritt. Vid insändande av förskottslikvid för mindre order bifogas 10 proc. till portokostnader.

Läroböcker, Ordböcker m. m.

Lärobok i Esperanto

av P. Nylén. 7:e uppl. Mycket spridd och omtyckt, särskilt lämplig för dem, som äga språkundervisning. 1:—.

Praktisk lärobok i Esperanto

för kurser och självstudium. Övers. fr. engelska av S. O. Jansson. Omväxlande, intressant och rik på förklarande exempel. 2:—.

Nyckel till Esperanto.

En miniatyrlärobok på 24 sid. med ordlista. Utmärkt för propaganda. 0:10.

Esperanto-svensk ordbok

av G. H. Backman. Den utförl. vi äga. 3:—. D:o inb. 4:—.

Svensk-esperantisk ordbok

av G. H. Backman. Oumbärl. för envar som skall skriva esperanto. 4:—. D:o inb. 5:—.

Vortaro de Esperanto

av Kabe. Helt på esperanto, ansedd som synn. tillförl. Inb. 4:—.

Fundamento de Esperanto

av D:r L. L. Zamenhof. Grammatik, övningsstycken och ordförteckn. på franska, engelska, tyska, ryska och polska språken. 1:75.

Fundamenta Krestomatia

av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken, avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25.

En bok som varje esperantist bör äga och grundligt studera.

Lingvaj Respondoj

av D:r L. L. Zamenhof. Esperantos skapare giver här utmärkta svar på språkliga spørsmål. Rekommenderas åt envar. 1:25.

Originala Esperanta Legolibreto

av H. Widström. Ny. Original på esperanto. Enkel o. trevlig. 0:50.

Unua legolibro

av Kabe. Den mest kända och spridda läseboken. 1:50.

Dokumentoj de Esperanto

de A. Möbusz. 2:25.

Tio sanningar om Esperanto.

Flygblad på 4 sid. 100 ex. 2:—.

Vad är Esperanto?

Flygblad. 100 ex. 1:—.

Brevkort

med svensk propagandatext. 10 st. 0:40, 100 st. 3:—.

Propaganda.

Världsspråksfrågan.

Särtryck av borgmästare C. Lindhagens motion vid 1926 års riksdag. En populärt hållen, mycket läsvärd avhandling. 0:50.

Esperantostjärnor

Vanlig femuddig grön stjärna, nål, 0:60.

D:o, d:o knapp, 0:75.

D:o, d:o brosch, 0:60.

Femuddig grön stjärna med inskript. "Esperanto", nål, 0:75.

Miniatyrstjärna, nål, 0:40.

Rund knapp med grön stjärna och inskr. "Esperanto Lingvo Internacia". 1:—.

U.E.A.-stjärnor (endast för medlemmar av U.E.A.), nål ell. knapp. 1:25.

"Praktisk lärobok i Esperanto

för kurser och självstudium".

Översatt och bearbetad av
S. O. Jansson.

144 sid. Pris 2 kr.

Förlagsföreningen Esperanto
Fack 698, Stockholm 1.

Fortsättningskurs i Esperanto

pr korrespondens.

Under ledning av kompetent
lärare.

6. lektioner. Pris 5 kr.

Svenska Esperanto-Förbundet
Fack 698, Stockholm 1.

Intresserar Ni Eder för Esperanto

det internationella språket?

Då bör Ni prenumerera på
Svenska Esperanto-Tidningen.

Adress: Fack 698, Stockholm 1.
Utkommer varje månad. Omväxlande innehåll, till övervägande delen på svenska. Prenumerationspriset är endast 2 kr. pr helår. Detta belopp kan insändas pr postanvisning eller i frimärken. Prenumeration även vid alla postkontor.

Prenumerera redan i dag!

Lingvaj Respondoj

de D-ro L. L. Zamenhof.

Plena kolekto. Enhavas tre utilajn klarigojn pri gramatikaj kaj aliaj lingvaj demandoj. Post Fundamenta Krestomatio ĝi estas la plej valora libro de la Esperantisto. La kolekto nur nun estas akirebla en unu volumo.

PREZO: Kr. 1:25.

Förlagsföreningen Esperanto
Fack 698, Stockholm 1.

BIBELN PÅ ESPERANTO.

Gamla och Nya Testamentet.

Gamla Testamentet översatt av D:r L. L. Zamenhof.

Bland alla hittills utkomna böcker är det ingen som i betydelse överträffar den till 840 språk översatta bibeln, oavsett vilken mening man sedan har om religiösa ting. Av Nya Testamentet, vilket förut funnits på Esperanto, har enbart i Sverige många hundra exemplar sålts, och det är givet att varje esperantist även vill ha den kompletta bibeln.

Vi fästa särskilt uppmärksamheten på den mönstergilla översättningen.

August Strindberg: La Insulo de Feliculoj

(Delycksaliges ö i Svenska Öden och Äventyr).

Vol. 17 av Internacia Mondliteraturo.

Det största svenska arbete som finnes på esperanto. Översättningen är på ett skickligt sätt utförd av Fil. Mag. Oskar Frode.

Dessa båda böcker böra finnas hos varje esperantist. Skynda att rekvirera dem, ju förr Ni beställer dem, desto förr får Ni läsa dem.

Under 1926 har även utkommit här i landet dels ett original på esperanto, ORIGINALA ESPERANTA LEGOLIBRETO av Henny Widström och dels en översättning från det svenska originalet, DATOJ KAJ FAKTOJ PRI LA PACMOVADO. Atminstone varje svensk esperantist bör äga även dessa.

Till FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.

Postfack 698, Stockholm 1.

Var god sänd mot postförskott

..... ex. Bibeln — i klotband, pris 7:00 — marocain 13:00 —
elegant skinnband 18:—

(Stryk det som ej önskas.)

..... " Strindberg, Insulo de Feliculoj, à kr. 1: 50

..... " Nilsson, Datoj kaj Faktoj pri la Pacmovado,
à kr 1:—

..... " Widström, Originala Esperanta Legolibreto, à 0:50

..... den..... 1926.

Skriv namn

och adress

tydligt!

Brevkort.

Till

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a.

Postfack 698



Stockholm 1.